

Slavaj dioj

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 12-an de oktobro 2016

Slavoj estas hindoeŭropanoj, kiuj sur historia scenejo aperis en la 5-a jarcento post Kristo, en historia periodo nomata popolmigrado. El sia prapatrujo en Azio la slavoj migris en Eŭropon. Tie ili dividiĝis en kelkajn branĉojn, kiuj jam neniam kunvenis. Tial diferenciĝis ne nur slavaj lingvoj, sed ankaŭ religioj de la branĉoj. Eble eĉ ĉiu vilaĝo kaj ĉiu slava tribo havis propran slavan dialekton kaj propran antaŭkristanan religion. Oni opinias, ke la slavoj origine adoris unu ĉefan dion kaj multe da aliaj dioj, sed post disiĝo ekkredis ankaŭ al dioj, kiuj antaŭe estis vivantaj homoj.

Pri slava religio ni scias malmulte, ĉar antaŭkristanaj slavoj ne havis skribon. Tial skribitaj atestoj pri slava religio devenas el kristanaj kaj islamanaj manuskriptoj. Nomoj de la dioj tial ofte estas kripligitaj, oni eĉ ne scias precize pri funkcio(j) de la dio kaj kiel aspektis liaj bildoj, statuoj kaj adorejoj. Unu dio povas havi diversajn nomojn (ekz. la dio Ĥors estas nomata ankaŭ Daĵbog, Svaroĵic aŭ Radegast).

Kristanaj misiistoj, pastroj kaj monaĥoj antaŭkristanan slavan kredon ne toleris, ĉar la unua ordono de kristana Dekalogo sonas: kredu je unusola Dio. En la libro Eliro de Malnova Testamento oni povas legi:

„La Dio diris al Moseo: „Gardu vin, ke vi ne faru interligon kun la loĝantoj de la lando, en kiun vi venos, por ke tio ne fariĝu falilo inter vi; sed iliajn altarojn detruu kaj iliajn statuojn rompu kaj iliajn sanktajn stangojn dishaku. Ĉar vi ne devas adori alian dion; ĉar la Eternulo, koleremulo estas Lia nomo, estas Dio kolerema. Ne faru interligon kun la loĝantoj de la lando; ĉar, malĉastante kun siaj dioj kaj alportante oferojn al siaj dioj, ili eble vokos vin kaj vi manĝos de iliaj oferoj, kaj vi prenos iliajn filinojn por viaj filoj, kaj iliaj filinoj malĉastos por siaj dioj kaj malĉastigos viajn filojn por siaj dioj. Diojn fanditajn ne faru al vi.“

Eliro 34, 12-17“

Plimulte da atestoj pri antaŭkristana slava religio tial estis intence neniigita. Ni scias nur fragmentojn, kiujn la slavoj transdonis perbuŝe.

Slavaj religioj similas al religioj de hindoj, irananoj, grekoj, romianoj, keltoj, germanoj kaj baltoj.

Sed nian horizonton nebuligas ankaŭ klopodo de kelkaj patriotoj, kiuj en la 19-a jarcento volis krei al malgrandaj nacioj grandan historion. Kelkaj naciaj revekiĝantoj de la 19-a jarcento ekzemple asertis, ke slavoj ĉiam estis en Eŭropo. Oni kreis teorion pri antaŭkristana klereco de slavoj. Oni serĉis eksan slavan adorejon sur ĉiu monteto. Oni fervore serĉis antaŭkristanan slavan skribon (slavajn runojn). (Vane.) – Kaj kompreneble en fantazio oni kreis multe da slavaj dioj. En falsitaj glosoj (1827) en mezepoka vortaro Mater Verborum troviĝas multe da pripensitaj nomoj de neekzistantaj slavaj dioj – la aŭtoro verŝajne estis Václav Hanka (1791-1861): „Porvata, Pŕíje, Letnicĉ, Chliba, Svoba, Svor, Sitivrat, Zcuor, Krt, Jarobud, Jasni“. En falsitaj „ĉeĥaj mezepokaj manuskriptoj“, kiuj estis „hazarde“ trovitaj en komenco de la 19-a jarcento (1816-1819), elpensitaj „slavaj dioj“ ankaŭ ludas signifajn rolojn.

Eĉ nun kelkaj aŭtoroj prezentas en siaj libroj miksaĵojn de fantazio kaj naiveco. Same kiel antaŭ kelkaj jaroj estis nekritike admiritaj keltoj, nun ankaŭ antaŭkristanaj slavoj estis idealigitaj. Ilia idealigita paganismo estas starigita kontraŭ kristanismo. Kelkaj aŭtoroj anstataŭas faktojn per fantazio. Tiel oni plimultigas falsajn spurojn.

Kie oni povas trovi la veron?

Arĥeologoj, kiuj en eksa Ĉeĥoslovakio esploris lokojn, kie situis slavaj loĝejoj, en Staré Město ĉe Uherské Hradiště kaj Valy ĉe Mikulčice, eksciis multe pri vivo de niaj slavaj antaŭuloj. Teorio pri depratempa ĉeesto de slavoj en Eŭropo estis malakceptita. Antaŭkristana slava skribo neniam estis trovita. Slavoj ne alvenis en grandega procesio, sed malrapide, kaŝe, po malgrandaj grupoj. Ili bedaŭrinde ne estis rekte influitaj per antikva kulturo. La lando, en kiun ili alvenis, jam estis setlita per germanoj.

Pri slavaj dioj bone informas monaĥo de Kijeva Peĉora Monaĥejo, kronikisto Nestor (1056-1114) en siaj „Rakontoj pri malnovaj tempoj“ (Повесть временныхъ летъ, 1113). En la jaro 980 kijeva princo Vladimir la 1-a (985-960?-1015) provis reformi antaŭkristanan religion. En Kijevio li ordonis krei **panteonon (diaron)** kun statuoj de ses elektitaj slavaj dioj: Perun, Ĥors, Stribog, Simargl, Mokoŝ kaj Veles. Laste menciita Veles ne staris sur monteto kun aliaj kvin dioj, sed ĉe foirejo, kiel patrono de komerco.

PERUN (ĉe baltoj Perkunas) estas ĉefa dio, la dio de fulmotondro. Perunon adoris ĉiuj slavoj.

Inter ortodoksaj kristanoj lia kulto estis transformita en kulto de malnovtestamenta profeto Elija). Tago de Perun estis ĵaŭdo, same kiel ĉe germanoj la ĵaŭdo nomiĝas „der Donnerstag“ (la tago de germana dio Donnerer). Se oni blasfemas, oni uzadas la nomon de Perun: poloj diradas „La tondro tion batu!“ („Niech to Piorun strzeli!“), slovakoj „do paroma!“ kaj laĥoj „do pĕruna!“, (germanoj analoge „Donnerwetter!“).

ĤORS (alie ankaŭ **DAĴBOG**, **SVAROĴIC** kaj **RADEGAST**) estas la dio de Suno, sano kaj ĉasado, filo de Svarog. Daĵbog ne devenas el ĉeĥa vorto „dĕšť“ („pluvo“), sed el praslava vorto „dažd“ („doni“), tial Daĵbog estas „la dio, kiu donas“. Subnome Radegast li estis adorata de tribo Rataroj. Lia adorejo estis neniigita dufoje (1068 – per episkopo Burĥard el Halstatt, ĉirkaŭ la jaro 1127 – per Lothar la 3-a).

La nomo Radegast povas deveni de la nomo de militestro Radegaist, kiu en komenco de la 5-a jarcento falis dum konkerado de Romo.

Turistoj, kiuj vizitis moravian montaron Beskydy, scias, ke sur monto Radhošť staras statuo de Radegast. Sed la statuo ne estas antaŭkristana monumento, sed kreaĵo el la 20-a jarcento. La 5-an de junio 1931 (antaŭ 85 jaroj) moravia skulptisto Albín Polášek dediĉis la statuon de Radegast al loka patriota societo Submontara Unuiĝo Radhošť (Podhorská jednota Radhošť).

„Radegast“ nun estas ankaŭ marko de la biero, kiun oni vendas en Ĉeĥa Respubliko.

STRIBOG estas la dio de vento kaj fulmotondro.

SIMARGL (Semargl) estas la dio, kies funkcioj ne estas klaraj, li eble estis protektanto de bienoj kaj greno, precipe hordeo.

MOKOŜ (Mokoŝa) estas la diino, kiu protektas virinojn, la diino de fekundeco, malseko. En Bohemio estas trovloko Mokošín apud Přelouč, sed neniuj atesto de adorado de Mokoŝ tie estis trovita. Moravia civitanina asocio Mokoŝa, kiu aranĝas intergeneraciajn renkontiĝojn de virinoj, rezidas en Račice-Pístovice (Regiono Vyškov, Ĉeĥa Respubliko).

VELES (Velas) estas la dio, kiu protektas bestojn, kaj la dio de infero, komerco kaj kontraktoj.

La reformo eble ne estis sukcesa, ĉar post ok jaroj, en la jaro 988, la sama princo Vladimir, kiu ordonis la statuojn de slavaj dioj instali, ordonis la statuojn disrompi kaj neniigi. La statuo de Perun eĉ estis ĵetita en la riveron Dnepro. Vladimir ne nur estis baptita, sed kristianigis siajn servutulojn.

(La epizodon pri dronigo de la statuo de Perun en Dnepro uzis Karel Havlíček Borovský (1821-1856) en sia satira poemo „La bapto de caro Vladimir“, ĉeĥe „Křest svatého Vladimíra“).

Por **orientaj slavo**j estas signifaj la dioj Rod, Roĵanjice, Svarog, Trojan kaj Veles.

ROD estas la dio de fekundeco kaj havas formon de penis. Precipe pro tio li ne plaĉis al kristanaj misiistoj. (Simile egipta dieto Bes, kiu plibeligis virinojn kaj vekigis seksan apetiton de viroj, estis desegnata kiel malbela vireto kun enorme longa penis.)

ROĴANJICE estas du diinoj, patrino kaj filino. Ili estis diinoj de rikolto, sed ankaŭ diinoj de sortoj. Oni oferis al Roĵanjice la unuafoje fortonditajn harojn de infanoj.

SVAROG estas la unua dio de tero, sed ankaŭ dio de metioj, patrono de forĝistoj. Lia filo estas Svaroĵic (Ĥors-Daĵbog-Radegast).

TRIGLAV (Trojan) estas la dio kun tri kapoj, kiun adoris Pomeranianoj. Li havis militan kaj ekonomian funkcion. Lia atributo estis nigra ĉevalo.

Ĉeelbaj slavoj kaj **Pomeranianoj** kredis je la dioj Ĉernobog, Ĉernoglav, Jarovit, Rujevit, Porevit, Podaga, Prove, Pripegala, Svantovit, Svaroĵic (Ĥors-Daĵbog-Radegast), Triglav, Ĵiva k. a.

ĈERNOBOG (Ĉarnobug) estas la dio de malbono.

ĈERNOGLAV (Tiarnaglofi) estas la dio de milito. Li estis adorata en Jasmund (Rujano). Lia statuo estis neniigita en la jaro 1171.

RUJEVIT estas mastro de Rujano, dio de milito.

POREVIT estas filo de Perun, dio de Rujano, kiu havis kvar kapojn (same kiel Svantovit).

PODAGA estas la dio de aero.

PROVE estas la dio de justeco (praslava „правъ“ signifas „justa“).

PRIPEGALA estas la dio de fekundeco. Magdeburga ĉefepiskopo Adelgott rakontis, ke al tiu ĉi dio estis oferitaj vivantaj homoj (1108).

SVANTOVIT estas potenca mastro de Rujano, kies adorejo estis neniigita per danoj. Li estis prezentita kiel viro kun kvar kapoj. Li estis la dio de plugado kaj donacinto de rikoltaĵo.

ĴIVA estas la diino de la vivo kaj la amo. En nia lando Ĵiva estas nomo de naturscienca ĵurnalo, kiun en la jaro 1852 fondis elstara ĉeĥa natursciencisto Jan Evangelista Purkyně (1787-1869).

Posta **folkloro aldonis la diojn**: Jarilo, Lada, Morana, Perperuna.

JARILO estas la dio de Suno kaj fekundeco.

LADA estas la diino de la amo, printempo, edzeco, semado kaj plugado.

MORANA (Morena, Mara) estas la diino de vintro kaj morto. En popola folkloro oni povas trovi ceremonion de adiaŭo de vintro, kiam homoj ĵetas kvazaŭhomon (Moranon) en riveron.

PERPERUNA estas la diino de pluvo.

Hipotetaj dioj estas Bjelbog kaj Pohvizd.

BJELBOG estas la dio de lumo.

POGVIZD (Pochvist, Podvist) estas la dio de vento (same kiel Stribog), kiun adoris orientaj slavoj.

Krom tio ekzistas multe da estaĵoj, kiuj ne estas dioj, sed havas supernaturajn kapablojn: **Baba Jaga, Diablo, Domovoj, Polevoj, Najado, Vod'anoj, Norno (Sortdiino), Vampiro** k. a.

Antaŭkristanaj slavoj ne sukcesis krei grandan panteonon kiel antikvaj grekoj kaj romianoj, sed slavaj dioj vivas en popola folkloro. Printempa popola kutimo ĵeti kvazaŭhomon (Moranon) en akvofluon kaj tiel adiaŭi de vintro, paskaj kutimoj kaj geedziĝaj kutimoj [forrabo de fianĉino, montrado de falsa fianĉino (viro en fianĉa vestaĵo) al fianĉo] atestas pri riĉa anima vivo de niaj antaŭkristanaj slavaj antaŭloj.

Literaturo

ČECH, S. (1946): Petrklíče. 11-a eld., Prago, Topičova edice, 53 paĝoj.

GROBCOVÁ, J. (2016): Probouzení Moravanů. Moravská mytologie, 1-a eld., Ostrava, Miluše Bajgerová, 235 paĝoj.

HORA-HOŘEJŠ, P. (1993): Toulky českou minulostí, 1-a vol., 2-a eld., Prago, Bonus Press, 277 paĝoj.

HORA-HOŘEJŠ, P. (1997): Toulky českou minulostí, 6-a vol., 1-a eld., Prago, Baronet & Via Facti, 230 paĝoj.

JIRÁSEK, A. (2016): Staré pověsti české. Prago, Dobrovský, 319 paĝoj.

KAISER, Z. (2015): Život našich předků, rituály a obřady, 1-a eld., ?, *vlastním nákladem*.

OVČAČIKOVÁ, A. (2001): Staré pověsti moravské. 1-a eld., Olomouc, Poznání, 181 paĝoj.

OVČAČIKOVÁ, A. (2003): Pověsti velkomoravské. 1-a eld., Olomouc, Poznání, 218 paĝoj.

PITRO, M. & VOKÁČ, P. (2002): Bohové dávných Slovanů, 1-a eld., Prago, ISV, 206 paĝoj.

PUTNA, M.C. (2015): Obrazy z dějin ruské religiozity, 1-a eld., Prago, Vyšehrad, 335 paĝoj.

ŘEZÁČOVÁ LUKÁŠKOVÁ, Z. (2016): Bohové a bohyně v nás, 1-a eld., Prago, Zoner Press, 175 paĝoj.

ŠINDLÁŘOVÁ, I. - RŮŽIČKA, J. (2003): Mýty a báje starých Slovanů, 1-a eld., Prago, Fontána, 130 paĝoj.

ŠTORCH, E. (1978): Zlomený meč. Povídka o markomanském králi Marobudovi. 2-a eld., Prago, Albatros, 165 paĝoj.